

- 19590

75 (1479)

La Brita Esperantisto

Marto — Aprilo 1979

BUONO SERA
GUTEN ABEND
BONSOIR
BONZER
Le Eurospud
(only 60 Guilders)



La
Brita Esperantisto

THE BRITISH ESPERANTIST
ELDONAĴO DE BRITA ESPERANTO-ASOCIO

75A Jaro, N-RO 828

Marto–Aprilo 1979

Eldonas:

LA BRITA ESPERANTO-ASOCIO, 140 Holland Park Avenue, LONDON
W11 4UF

Redaktoro:

WILLIAM AULD

20 Harviestoun Road, DOLLAR, Skotlando FK14 7HG

Reklamoj: £20 por tuta paĝo, kaj samtarife (plus 15%) ĝis okona paĝo. Unu senpaga el tri.

Nek la Asocio nek la Redaktoro respondecas pri la personaj opinioj esprimitaj de kontribuintoj al la revuo, kondiĉe ke la esprimoj ne estas kontraŭlegaj.

UK ISSN 0007-067X

**A
BEGINNER'S COURSE
OF ESPERANTO**

BY

Rev. W. J. Downes

£1.32 postfree

☆ An excellent book

☆ Copious exercises

Apply:

C. C. Preston, 31 Henbury Road, W.O.T.,
Bristol BS9 3HQ

Kial Esperanto havas la vorton “birdo”?

Bernard Golden

Se oni demandus pri la etimologio de la vorto “birdo” en Esperanto, ĉiuj, eĉ tiuj kun la plej supraĵa scio de la angla lingvo, dirus, ke ĝi devenas de la vorto *bird*. Prave! Tamen, estigas eĉ pli grava demando: kial Zamenhof decidis uzi tiun anglan vorton kiel la etimon de la vorto en Esperanto? De la vidpunkto de internacieco, “birdo” ja estas anomalio en la Esperanta vortprovizo, ĉar ĝi tute ne konformas al la kriterioj de internacieco de formo, kiujn Zamenhof mem detale priskribis en la antaŭparolo al la unua lernolibro de Esperanto.

“... la vortaron mi kreis ne arbitre, sed kiom eble el vortoj konataj al la tuta klera mondo. Tiel ekzemple la vortojn, kiuj estas egale uzataj en ĉiuj civilizitaj lingvoj /la tiel nomatajn “fremdajn” kaj “teĥnikajn”/ mi lasis tute sen ia ŝanĝo; el la vortoj, kiuj en malsamaj lingvoj sonas malegale, mi prenis aŭ tiujn, kiuj estas komunaj al du aŭ tri plej ĉefaj Eŭropaj lingvoj, aŭ tiujn, kiuj apartenas nur al unu lingvo, sed estas popularaj ankaŭ ĉe la aliaj popoloj; en tiuj okazoj, kiam la donita vorto en ĉiu lingvo sonas alie, mi penis trovi vorton, kiu havus eble nur signifon proksimuman aŭ uzon pli maloftan, sed estus konata al la plej ĉefaj nacioj /ekzemple la vorto “proksima” en ĉiu lingvo sonas alie; sed se ni prenos la latinan “plej proksima” /*proximus*/, tiam ni vidos, ke ĝi, en diversaj ŝanĝoj, estas uzata en ĉiuj plej ĉefaj lingvoj; sekve se mi la vorton “proksima” nomos *proksim*, mi estos pli aŭ malpli komprenata de ĉiu klera homo/; en la ceteraj okazoj mi prenadis ordinare el la lingvo latina, kiel lingvo duone-internacia. /Mi flankiĝadis de tiuj ĉi reguloj nur tie, kie tion ĉi postulis apartaj cirkonstancoj. kiel ekzemple la evito de homonimoj, la simpleco de la ortografio k.t.p. /IKPŬ, vol. 1, p. 21/

El tio estas konkludeble, ke

1. “Birdo” ne estas fremda aŭ teknika vorto, t.e. vorto egale uzata en ĉiuj civilizitaj lingvoj.
2. “Birdo” ne estas komuna al du aŭ tri plej ĉefaj Europaj lingvoj. La moderna angla *bird* devenas de Oldangla *bridd*, kiu ne havas parencajn formojn en la nuntempaj ĝermanaj lingvoj. Iliaj vortoj estas parencaj al la angla *fowl*: /germane/ *Vogel*, /nederlande/ *vogel*, /svede/ *fogel*, /dane kaj norvege/ *fugl*.
3. Kvankam “birdo” apartenas al nur unu lingvo, ĝi ne estas populara ankaŭ ĉe la aliaj popoloj; ili ne uzas ĝin, ĉar ili havas sian propran vorton por tiu animalo.
4. “Birdo” havas uzon pli maloftan, sed estas konata al la plej ĉefaj nacioj nur, se oni rigardas la anglan lingvon, same kiel la latinan, kiel lingvon “duone-internacian”.
5. Zamenhof ne povis preni la vorton por “birdo” el la latina lingvo, ĉar *avis* fariĝus en Esperanto “avo”, kiu estus homonimo de “avo”, venanta de la latina *avus* kaj signifanta “patro de patro aŭ patrino”. “Avo” troviĝas jam en pra-Esperanto 2 /1881–1882/ kaj ĝi restis senŝanĝa en la zamenhofa reformprojekto de 1894.

Ni ne scias, kiun vorton Zamenhof uzis por “birdo” en la plej fruaj formoj de Esperanto, pra-Esperanto 1 aŭ *Lingwe Uniwersala* /1878/ kaj pra-Esperanto 2 /1881–1882/. En la reformprojekto de 1894 li elektis la radikon *ukcel-*, kiu apenaŭ estas pli internacia ol “birdo”; ĝi estas facile komprenebla nur al iu scianta la italan vorton *uccello*.

Jacob /1947, p. 95/ rimarkigas, ke neniu planlingvo trovis tute kontentigan solvon por la vorto “birdo”. Zamenhof certe konsciis pri tiu malfacilaĵo. Por

kompili internacian vortprovizon, planlingvistoj kutime aplikas la DEFIRS-principon. /DEFIRS = Deutsch, English, Français, Italiano, Russkij, Spanish/. Ne ekzistas unu sola morfemo komuna al ĉiuj ses lingvoj kun la signifo “birdo”, do la vortoj en aliaj planlingvoj estas nur relative pli internaciaj. Ni komparu la vortojn por “birdo” en la DEFIRS-sistemo kune kun du parencaj vortoj, kiu estas vere internaciaj.

Tabelo A.

“Birdo” en la DEFIRS-sistemo

D.	Vogel
E.	bird
F.	oiseau
I.	uccello
R.	ptitsa
S.	pájaro, ave

Tabelo B. de la latina *avis*

de la helena *ornis, ornithos*

D.	Aviatik	Ornitolog
E.	aviation	ornithologist
F.	aviation	ornithologiste
I.	aviazione	ornitologo
R.	aviatsija	ornitolog
S.	aviación	ornitólogo

Tabelo C. La vorto “birdo” en la plej bone konataj planlingvoj

Volapuko /1887/	böd
Esperanto /1887/	birdo
Latino sine flexione /1903/	avi
Ido /1907/	ucelo
Occidental = Interlingue /1922/	avie
Novial /1928/	fogle
Interglossa /1943/	avi
Interlingua—IALA /1951/	ave

Plej vaste uzata estas vortoj devenantaj de la latina *avis*, kies internacieco manifestiĝas en DEFIRS-vortoj por “aviado” /Tabelo B/. *Fogle* en Novial havas parencajn formojn en ĝermanaj lingvoj, sed tio ne faras ĝin internacia. *Ucelo* en Ido devenas de la itala *uccello*, kaj ĝi estas malpli internacia ol *fogle*. Oni povas diri la samon pri *böd* en Volapuko kaj *birdo* en Esperanto, kies komuna etimo estas la angla *bird*.

Laŭ Dyer /1923, p. 165/ *ornit*, venanta de la helena *ornis, ornithos*, estas verŝajne la plej bona solvo, de la starpunkto de internacieco. Tabelo B montras la DEFIRS-internaciecon de la vorto “ornitologo”. Tamen, neniu aŭtoro de planlingvo uzis ĝin kun la escepto de Johann Martin Schleyer, kiu modifis la helenan vorton per elimino de la unua silabo kaj kreis la sufikson *-it* por nomoj de birdoj en Volapuko: *kamerit* /kanario/, *galit* /najtingalo/, *lostit* /struto/.

Kiu rilato ekzistas inter *böd* en Volapuko kaj “birdo” en Esperanto? Vortoj kun anglaj etimoj estas multe pli oftaj en Volapuko /proksimume 40% de la vortprovizo/ ol en Esperanto. La kripla skriba formo *böd* rezultis de la elaso de la litero “r” por eviti konsonant-grupiĝon en la vorto, kaj ankaŭ ĉar Schleyer opiniis, ke “r” estas tro malfacile prononcebla konsonanto por ĉinoj, infanoj kaj maljunuloj. Cetere, kvankam la origino de la volapuka vorto ne estas facile divenebla laŭ la skriba formo, la parolata vorto estas tre proksima al la brita prononco de *bird*. Male, en Esperanto nur la skriba formo similas al la etimo. Surbaze de miaj esploroj pri la rilato inter Volapuko kaj Esperanto, mi opinias, ke Zamenhof ne nur havis bonan scion pri Volapuko, sed eĉ uzis elementojn de tiu lingvo en Esperanto /Golden, 1977/. Estas tre probable, ke Zamenhof elektis la vorton “birdo”, ĉar li estis influita de la jam ekzistanta *böd* en Volapuko.

DYER, Luther H. 1923. *The problem of an international auxiliary language and its solution in Ido*. London.

GOLDEN, Bernard. 1977. *The influence of Volapük on Esperanto as indicated by lexical data*. /nepublikigita referaĵo/.

IKPV = IAM KOMPLETIGOTA PLENA VERKARO de L. L. Zamenhof. 1973. Vol. 1: *Unuaj libroj por esperantistoj*. Kameoka, Japanio.

JACOB, H. 1947. *A planned auxiliary language*. London.

WOOD, M. W. 1889. *Dictionary of Volapük*. New York.

VOLAPUKO CENTJARA

Ĉijare okazos la centjara festo de la unua internacia lingvo praktikebla kaj praktikata, Volapuko. Dum Zamenhof ankoraŭ perfektigis siajn ideojn, Johann Martin Schleyer, germana pastro, la 31an de marto 1879, finpensis la principojn de sia lingvo. Du monatojn poste li publikigis la skizon en gazeto kaj tiam, en 1880, sep jarojn antaŭ la Unua Libro de Esperanto, li eldonis sian unuan gramatikon kaj vortareton.

Tuj la literaturo kaj movado de Volapuko kreskiĝis, ĝis, en 1889, tra la tuta civilizita mondo, eĉ en Japanujo, Ĉinujo kaj centra Afriko, ekzistis almenaŭ unu miliono da membroj (laŭ taksado de kritikulo), pli ol 250 kluboj, pli ol 50 revuoj, kaj pli ol 500 eldonaĵoj. Jam du vaporŝipoj sur la rivero Rejno portis la nomon "Volapük". Ĉio ŝajnis preta por la plena akcepto de la lingvo ĉie.

Tamen bedaŭrinde tiun saman jaron ekkomenciĝis misfortunoj: personeca kaj organiza kverelo inter la kluboj en Munkeno kaj Nurenbergo elradiiĝis tra tuta Germanujo. Membroj foriris; malamikoj atakis. La malfortiĝo daŭris en la dudekan jarcenton. Schleyer mem mortis en 1912 okdekunjara.

Tiam, en 1931, Volapuko akiris novan vivon: E. J. Brill, Leiden, Holando, eldonis la definitivajn verkojn de D-ro Arie de Jong, kiuj estas ankoraŭ haveblaj hodiaŭ. Ili estas "Gramat Volapüka", gramatiko de la lingvo, kaj "Wörterbuch der Weltsprache", granda vortaro en kaj el la germana. Revuo "Volapükagased pro Nedänapükans" daŭris kiel la organo de la tutmonda volapukistaro.

Nun ekzistas malmultaj volapukistoj. Sed la lingvo havas novan rolon: la lasta Ĉefestro de la movado, Johann Schmidt, deklaris, ke Volapuko staras rilate al Esperanto kiel la latina kaj antikva greka lingvoj al la modernaj naciaj lingvoj. Ĉar la lingvo ne plu minacas aŭ konkuras,

esperantistoj povas senpartie sperti la proprajn simplecon, belecon kaj logikon de Volapuko. Pro tio, precize por la centjara datreveno, fervora angla volapukisto kaj esperantisto, Brian Bishop, jam skribis la unuan gramatikon de Volapuko en Esperanto kun volapuka-esperanta vortareto.

Hodiaŭ, same kiel Zamenhof mem en la Bulonja Kongreso en 1905, la esperantistaro povas diri, "Ni esprimas nian koran dankon al sinjoro Schleyer, la unua kaj plej energia pioniro de la ideo de neŭtrala lingvo internacia", kaj, kun la volapukistoj, trinki glason da vino honore al li kaj lia lingvo la vesperon de la 31a de marto.

Mark Pallen

MIA AVO ĴUS MORTIS HOSPITALE

Mia avo ĵus mortis hospitale.
Mi deziras fariĝi monumenton por li.
Sed oni ne farus.

Li ne estas tiel grava, tiel bone konata
homo.

Mia avo ĵus mortis hospitale.
Mi deziras verki libron, dediĉi ĝin al li.
Sed mi ne kapablus.
Mi ne estas romanisto, libroverkisto.

Mia avo ĵus morits hospitale!
Mi deziras krei tion en la straton!
Sed oni ne aŭskultus.
Li estas nur alia mortinto, inter ceteraj.

Mia avo ĵus mortis hospitale!
Mi deziris viziti lin antaŭe!
Sed mi ne povis.
Mi estas, mi mem estas, malsana.

Mia avo ĵus mortis hospitale.
Mi deziras fari monumenton por li
Do, mi verkas poemon.
Li ja estis tiel grava, tiel bone amata
homo.

KONFUCEO 551 – 479 A.K.

Kiam Konfuceo naskiĝis, Ĉinujo havis 13,000,000 loĝantojn kaj 72 ŝtatojn. Konfuceo ĉefministris la ŝtaton Lu en la valo de la Flava Rivero. Li ekziliĝis kiam lia duko akceptis donacon de 80 kantistinoj kaj interrompis la laboron de la kortego. Oni revokis lin kiam li aĝis 68 jarojn.

Jen kelkaj aforismoj de Konfuceo:
 Prema rego estas pli kruela ol tigro.
 La superulo ne estas ilo.
 La plej inteligentaj kaj la plej stultaj
 neniam ŝanĝiĝas.

Konfuceo demandis al kvar disĉiploj, kion ili farus se ili havus povon. La unua respondis, ke li volus administri ŝtaton post invado, senpluveco kaj malsatego kaj restarigi ĝin post tri jaroj. La dua elektis administri ŝtaton. La tria volis helpi en templo. Sed Tseng Hai diris, ke li volus sin bani printempe kun ses knaboj kaj ses plenaĝuloj kaj reveni hejmen kantante. Konfuceo diris: "Mi konsentas kun Tseng Hai".

Pri homo kiu ĉiam manĝis Konfuceo diris: "Pli bone estus se li ludus dam-ludon".

Ĉe mi ne estas refleksebla *vi devas aŭ vi ne devas*.

Pordogardisto demandis al Tzu Lu, "De kie vi venas?" "De Mastro Konfuceo." "Ĉu li ne estas la homo kiu scias ke li ne povas sukcesi kaj ĉiam penas?"

En edukado ne devus esti klasdiferencoj.

Iu demandis, "Kion vi pensas pri tio, ke oni repagu malamon per amo?" "Per kio do vi repagus amon? Repagu malamon per justo kaj amon per amo."

Kial vi ne studas la poetojn? La poezio povas stimuli la menson, eduki la observon, instigi sociajn rilatojn, moderigi la ĉagrenojn de la vivo, instrui plenumi la devojn al gepatroj kaj la princo, kaj konigi la nomojn de birdoj, bestoj, plantoj kaj arboj.

Kiam la stalo brulis, li demandis, "Ĉu iu suferis?" Li ne demandis pri la ĉevaloj.

"La floroj en la ĉerizarbo
 Ŝanĝiĝas kaj tremetas:
 Mi ne povas alie fari ol pensi pri vi
 En via malproksima loĝejo."

Konfuceo diris, ke la poeto ne pensis bone. Se li pensus bone, la loĝejo ne estus malproksima.

Tzu Lu demandis al li, kion li farus unue. "La ĝustigon de nomoj. Se la nomoj ne estas ĝustaj, la lingvo ne akordiĝas al la vero. Se la lingvo ne akordiĝas al la vero, la artoj ne estas eblaj. Se la artoj ne estas eblaj, ceremonioj kaj muziko ne prosperos. Se ceremonioj kaj muziko ne prosperos, la punoj ne estos justaj. Se la punoj ne estos justaj, la homoj ne scios, kiel movi la manojn kaj la piedojn."

S. Beer

UNIVERSITATA PREMIO, 1978

La Aljuĝa Komitato de la Senato de la Universitato Liverpool aljuĝis la Premion John Buchan (valoro £100) por Esperanto al s-ro Raymond Smith el Nantwich, Anglio. Proksima konkurinto estas s-ro Thomas Neil el Dumfries, Skotlando.

La kandidatoj devis traduki sufiĉe longan tiraĵon el la humura-sprita eseo "Plendo de Fraŭlo" de Charles Lamb ("Elia"), kaj ankaŭ verki originalan eseon pri la temo "La gravo de logika kaj laŭeble simpla reguleco ĉe internacia lingvo".

B. M. Cavanagh,

Lekciisto en la Fako de Esperanto de la Universitato Liverpool.

NEKROLOGO

Tucker. Forpasis la 11an de decembro 1978 en Nottingham s-ro Alfred George Tucker, 89-jara. Li estis fakdelegito pri paco kaj kvakerismo en tiu urbo. Li post-lasas filon kaj du filinojn, al kiuj ni esprimas kondolencon.

NIA KOVRILO

Apudvoja afiŝo pri terpomoj, Romford, Essex. (Foto: Raif Markarian.)

Du Naivuloj en Ok Landoj (3)

LA MALFACILA ARTO MANĜI

Ek al Varna kaj la Universala Kongreso! Brila suno, blua ĉielo, aŭtovojo nova kaj larĝa, kaj aŭto kiu glate iris. Sofio estas urbo de unudirektaj vojoj.

“Ni iru al la aŭtovojo, kaj tie kontrolu la tabulojn!” ni decidis.

Baldaŭ Sofio komencis maldensiĝi, kaj foraj montetoj vidiĝis.

“Ni lasas la urbon,” mi kriis. “Ni kontrolu la vojon buŝe, ĉar la tabuloj ne indikas la itineron al Varna!”

Ni forlasis la vojon antaŭ longaj apartamentaj blokoj el blanka betono. Estis sabato matene, kaj la gebulgaroj vizitis butikojn en la teretaĝoj de la blokoj. La bulgaroj, laŭ sia prudento, disigis la trafikon de la homoj. Tamen, ni atingis vojeton, kaj poste, trotuaron. Tie staris dika oficiro en uniformo. Pri socialismaj uniformoj mi scias nenion. Ĉu li estas rusa aŭ bulgara, ĉu milita, polica aŭ eĉ Sav-Armea, mi ne sciis. Mi montris mapon. La vojo forkiĝis. Ni volis la nordan, ne la sudan. Mi klarigis per fingro kaj dudeko da vortoj de primitiva ruslingvo, aĉa, sed efika. Jes, ni estas sur la ĝusta vojo. Mi redemandis, kaj li reasertis. Malgraŭ ia instinkta dubo, ni antaŭeniris. Tamen, vere ni estis sur la suda vojo—tiu al Turkujo kaj Istanbulo—kiel baldaŭ ni konstatis. La centraj montoj estis norde de ni.

“Nu,” (ni ĉiam diras “nu” fronte al aventuroj) “nu, ni ĉiam volis vidi la vojon al Istanbulo. Kiel romantike kaj aventure estas!” diris unu. “Kaj tute ne gravas, “diris la alia, “ĉar ni povos iri norden tra la montoj.”

Kaj kiaj belaj montoj! En unu valo estis granda preĝejo grek-ortodoksa kun oraj kupoloj, kiuj glorie radiis sub la posttagmeza suno, kvazaŭ pro interna fajro.

Post supren-suben zigzag-irado dum multaj horoj, ni atingis Varnan en la mallumo, kaj poste, nian hotelon en Drujba. Drujba troviĝas ĉe la marbordo kvar-kvin kilometrojn norde de Varna.

Ni lavis nin, kaj revestis nin, ĉiu per bela ĉemizo kaj somera jaketo. Kvaronhoron antaŭ la deka ni atingis la manĝsalonon. La tapiŝo estis luksa, la lustroj pli luksaj, kaj la manĝsalono luksega. Oficisto en uniformo staris antaŭ la pordo, kaj rifuzis enlasi kiun ajn. “Plenpakita,” li diris.

“Ni estas gastoj de la hotelo.”

“Ne troviĝas sidlokoj. Bonvolu atendi!”

“Ĝis kiam?”

“Mi ne scias.”

Germanoj, bulgaroj, francoj, kaj aliaj alvenis. Ili plendis, disputis, flatis, kaĵolis; ili malĝojis, koleris, aŭ malkaŝe ne kredis. Preskaŭ ĉiuj foriris, sed ne ni. Toĉ estas parte Jorkŝira, parte Lankaŝira, kaj parte Skota. Al mi mankas nur la Jorkŝira ingredienco. Ni restis. “Kaj neniu alia kaptos nian vicon,” ni ĵuris. Je dek post la deka oni permesis, ke ni eniru la salonon.

Gi estis nur duonplena. Muzikistoj ludis, kelneroj en pompa smokingo glitis tien kaj reen, sed neniu rapidis al ni. Post kvin minutoj kelnero, kiu parolis la anglan, venis por akcepti nian mendon. Ni mendis la unuan pladon kaj botelon da ruĝa vino. Nian paciencon, aŭ obstinon, la dioj rekompencis! Sed: post fiero venas la falo. La unua plado estis bongusta. Ni atendis. Atendadis. Mi alvokis la kelneron.

“Ni pretas mendi pluan pladon.”

Li miris. “Sed estas jam duono post la deka. La kuiristoj rajte ĉesas labori je la duono post, kaj foriri. Baldaŭ vi vidos ilin hejmenirantajn.”

“Sed vi eknutris nin. Ni volas fini la manĝon; ni malsategas. Kion fari?”

Bedaŭroj. Estas *Meĥana* sube. Kio estas *meĥana*? Taverno. Tie oni povas manĝi ĝis la dua matene. Gi estas parto de la sama hotelo.

“Kaj ni malŝparis la tempon ĉi tie”, mi

riproĉis iom akre, pro la acidoj, kiuj jam komencis digesti mian stomakon.

Ni vizitis la Meĥana-n. Cigana trio ludis kaj kantis. Kliento komencis kanti kanzonon ruse. Ni mendis bieron kaj sandviĉojn, kaj tiel kompletigis nian Solenan Vespermanĝon. Ni ĵuris, ke neniam plu ni manĝos vespere en tiu hotelo. Poste, ni eltrovis, ke aliaj samideanoj en aliaj hoteloj same ĵuris pri la siaj.

La postan matenon ni iris al la Kongresejo por la Inaŭguro. Tie preskaŭ kvin mil homoj formike svarmis ekster ŝlositaj pordoj. Fotiloj ĉie klakis. Lastmomente iu malfermis la pordojn, kaj tiuj, kiuj venis malfrue la antaŭan vesperon, kuregis al subtera deponejo por havigi al si siajn dokumentojn. Ĉiu Esperantisto nepre havu du akrajn kubutojn kaj ŝtalajn ripojn. Viclinio estas nur vorto en vortaro, ne fakto de la vivo—revo por idealistoj.

Dum la Inaŭguro la Kongreson alparolis la Unua Vicprezidento de Bulgaraĵo, kaj Ambasadejoj sendis mesaĝojn. Sole la francoj kaj britoj restis sen saluto de siaj ŝovinismaj registaroj. Miregis miaj bulgaraj kunsidantoj.

Poste, al la manĝejoj. Mi promenis eble duonkilometron, vidante nur bierejojn kaj glaciaĵejojn Mi trinkis bieron. Maljuna Esperantisto alvenis. “Ĉu vi scias, kie manĝi en ĉi tiu urbo? Mi serĉis ĉie, kaj ne povas trovi.”

Mi decidis esplori. En unu restoracieto mi trovis multe da Esperantistoj. Ili atendis dum pli ol dudek minutoj, sed neniu akceptis la mendon. Subite, virino alkuris kaj demetis telerojn antaŭ ĉiun, inkluzive de mi. Mi ne mendis, sed tie kuŝis amaso da kolbasoj kaj legomoj. Estante vegetarano mi rifuzis, postulante omleton. Iu tradukis. Ŝajne, nur meti la postajojn sur seĝon estis mendo! La manĝo estis fiksita—supozeble la bulgara ekvivalento de britaj fiŝo kaj frititaj terpomoj.

Ek al alia restoracio! Jes, mi povas mendi kion ajn laŭ la manĝokarto. Ne, mi ne povas havi omleton—oni ne vendas

ovojn dum la somero.

Ek al plua loko! Per sistemo de antaŭmendo, aĉetitaj biletoj, kaj irado al diversaj servotabloj, mi havigis al mi rostitajn fromaĝsandviĉojn, kaj ne sole kafon, sed ankaŭ teon. La lasta estis rezulto de lingva miskompreno. *Mia* bulgarlingva “aŭ” estis *ilia* bulgarlingva “kaj”. Nu . . . *ili* estis bulgaroj.

Dum la vespero ĉiu parolis ripete pri unu temo—kiel, diable! manĝi? Je manĝhoroj la mil bulgaraj samideanoj malaperis (mi supozis, ke ekzistas tute kaŝitaj, subteraj restoracioj por la indigenoj). Aliaj kongresanoj piknikis en la aŭtejo, kaj interŝanĝis informojn kaj trukojn. Ni lernis multon. En kelke da hoteloj oni ne povas matenmanĝi dum unu tago en la semajno (“Estas *higiena* tago!”). Hotelaj baroj fermiĝas aŭ restas malfermaj, sen averto. Matene, kelneroj en bela uniformo ne servas, sed forigas telerojn, aŭ pagigas al gastoj. En la Kongresejo, kun sidlokoj por 5,000 homoj, la “refreŝigejo” konsistas el nur du giĉetoj, kie vendiĝas du specoj de sandviĉo, du specoj de kuko, limonado kaj biero. Ĉi tiuj frandaĵoj ofte elĉerpiĝas. Unu anonima Esperantisto resumis:

“Estas vero, ke oni ĉeestas Universalan Kongreson ne por la manĝoj, sed por renkonti Esperantistojn.” Kaj laŭ tiu normo la Kongreso treege sukcesis.

(*Daŭrigota: “Tra la Lando de Drakulo”*)

Don Lord

Valentino

MUZIKA REVO?

Sola,
Por trovi vin mi estus
Sola.
La muziko vin kreas,
Vian voĉon mi aŭdas,
Viaj vortoj min sorĉas,
Viajn karesojn mi spertas;
Ĉu vi vere ekzistas,
Aŭ ĉu,
Sen muziko mi restos
Sola?

Geoffrey Chaucer

LA RAKONTOJ DE CANTERBURY

La Plugisto

Plugisto, lia frato, kun li iris;
Jam multan sterkon lia ĉaro tiris.
Bonlaboristo estis li, lojala,
Vivanta pace kaj kun am' kristana.
En ĝojo kiel ankaŭ en doloro
Li amis Dion per la tuta koro
Kaj poste, laŭ ordon' evangelia,
Li amon montris al najbaro sia.
Pro nomo Krista draŝus li la grenon
Por malriĉul', aŭ fosus la ĝardenon,
Laŭ sia povo eĉ senrekompence.
Li pagis dekonaĵojn konsciencie
El sia posedaj' kaj laborpago.
Sur ĉevalin' li rajdis en tabardo,

Ĉeestis Muelist' kaj Intendanto,
Somnero ankaŭ kaj la Absolvanto,
Manciplo kaj mi mem. Finiĝis listo.

La Muelisto

Fortega homo, jen la Muelisto;
Potenc' de liaj ostoj kaj muskoloj
Sukceson portis en atletaj roloj.
En lukta sport' li nevenkebla ŝajnis;
Virŝafon por premio ĉiam gajnis.
Li estis larĝa, dika vulgarulo,
Fortike konstruita je la ŝultro.
De sur ĉarniroj li pordegon levas
Aŭ bovatake per la kapo krevus.
De vulpa ruĝo la koloro barba
Kaj al fosila kling' egale larĝa.
Troviĝis sur la naza pint' veruko,
Sur kiu ruĝe kreskis hara tufo;
Kaj sub la nigraj truoj de la nazo
Buŝego granda kiel noktovazo.
Farsulo estis li kaj babilema,
Inklina al la kruda kaj blasfema.
Li sperte povis ŝteli el la greno,
Falsante kvoton per triobla preno.
Dikfingron oran havis li sen dubo.
Li havis blankan jakon kun kapuĉo;
Portiĝis flanke liaj glav' kaj ŝildo
Kaj sub la brako lia sakfajfilo.
Ludante ĝin ĉe l' fronto de l'kolono,
Li brave nin kondukis el Londono.

La Manciplo

Manciplo nia servis iun templon,
Al provizistoj donis li ekzemplon
Pri saĝa aĉetad' de provianto.
Egale per kredit' aŭ per kontanto
Li tiel zorgis en la negocado,
Ke staris li en avantaĝa stato.
Ĉu ne okazas nur per graco Dia,
Ke la sagac' de malklerulo tia
Superas tiun de la klera homo?
Li tridek mastrojn havis en la domo;
En leĝaj studoj ili diligentsis,
Kaj el dekduo ĉiu kompetentis,
En iu ajn provinco de Anglujo,
Fariĝi ekonom' por altrangulo
Kaj savi lin de vivo tro elspeza,
De malhonora ŝuld' (se ne freneza),
Aŭ plani, ke li vivu tiel ŝpare,
Ke povus li monhelpi malavare
Provincon tutan, kiam necesiĝis;
Sed ilin la Manciplo mistifikis.

La Intendanto

La Intendanto estis tre maldika,
Ekkolerema, kurte hartondita.
Tra stopla barb' videblis la makzeloj,
Senharaj arkoj super la oreloj;
Kaj lia verto pro la kurta tondo
Similis preskaŭ al tonsura rondo.
Senkarnaj estis liaj longaj gamboj,
Sen suroj ankaŭ same kiel stangoj.
Grenejon gardis li kaj ĉiun keston;
Ne trovus revizoro falsateston.
Laŭ pluvo aŭ sekeco de l'sezono
Profetis li la kyanton de l'rikolto.
Por ŝafoj, la bovar' kaj ĉiu porko,
Ĉevaloj kaj la birdoj de la korto,
Ke restu la laktej' en bona ordo,
Responda estis li aŭ sia lordo,
Al kiu li jam donis inventarojn
De kiam tiu havis dudek jarojn.
Neniu trovus mankojn en la listo.
Ne vivis tamen ia laboristo,
Paŝtisto, kamparan' aŭ eĉ balifo,
Pri kies malhonesto aŭ perfido
Ne havis li suspekton aŭ raporton.
Egale ili timis lin kaj morton.
Troviĝis lia dom' sur kamp' erika;
Per verdaj arboj estis ĝi ombrita.
Pli saĝe ol la mastro li aĉetis;
Provizon riĉan kaŝe li kunmetis.

Li sciis ruze plaĉi al la mastro
 Per tre helpema prunto aŭ donaco
 El ties posedaĵo, kaj pro tio
 Returne venis danko kaj premio.
 Junaĝe kiel metiist' ĉarpenta
 Li estis laboristo kompetenta
 Makule griza kaj kun digna troto,
 Nomiĝis lia virĉevalo 'Skoto'.
 Li portis superveston tre servantan
 Kaj flanke sian glavon rustiĝantan.
 De Norfolk venis nia Intendanto,
 El Baldesvel', por esti pilgrimanto.
 Zonita kvazaŭ Frato ĉe l'talio,
 Lastulo li en nia procesio.

Trad: W. B. Johnson.

Balifo. Sub-Intendanto.

Dikfingron oran. Aludo al la proverbo, "Honesta muelisto havas oran dikfingron". Laŭ kriterio muelista li estis relative honesta.

Manciplo. Proviantisto de kolegio aŭ de simila Instituto.

Tabardo (Laborista). Vasta, senmanika supervesto el vulgara ŝtofo.

Templo. Unu el la du "temploj" de la Inns of Court en Londono.

LAŬ MIA OPINIO . . .

Tre interesaj en la lasta BE estis la artikolo de Edwin de Kock kaj ankoraŭ pli via Intervjuo. Ĝi ankaŭ sendis min al relego de Lanti.

La fido kiun li esprimas sur pp. 58–59 de "Naciismo", ke la teknika evoluado enkondukos epokon de racia pensado kaj forigos la mistikismon, montriĝis iluzia. Antaŭ preskaŭ 50 jaroj tiu fido estis tenebla. Certe mi mem legis lian libreton kunsente kaj senkritike.

Tamen lia kredo, ke la raciemo kiu ebligis grandegan progreson en teknologio kaj sciencoj "finfine superregos en la mensoj de la homoj" estis nur koncepto intelektula. La granda plimulto de la homoj ne sin ĝenas fari abstraktajn principojn, sed antaŭ ĉio reagas al la materiaj sekvoj de sociaj, teknikaj kaj politikaj ŝanĝoj. Du rezultoj en ĉi tiu kazo estis, unuflanke, grandega eksplodo de la materialismo kaj aliflanke forkuro al novaj mistikismoj. Feliĉe, ke malaperis plejparte la fantazioj pri persona Dio kaj postmorta vivo, sed malfeliĉe, ke anstataŭis ilin eĉ pli misgvidaj fantazioj pri la ĝismorta vivo.

Komuna sort' de homo kaj homaro
 Pilgrimi de stultaĵo al stultaĵo.

(Petante ĉies pardonon!)

Kompare kun Lanti, Zamenhof, kiel apostolo de "Homaranismo" kaj aŭtoro de l' "Preĝo sub la Verda Standardo", estis mistikulo. Tamen li klare antaŭvidis, ke se la mondo adoptus Esperanton ĝi "fariĝus posedaĵo de la tuta homaro, perdos sian karakteron idean; tiam ĝi fariĝos nur lingvo, oni jam ne batalos por ĝi, oni nur tirados el ĝi profiton". Ĉu eble la vizia elemento en la temperamento de Zamenhof donis al li pli ĝustan intuicion pri la homa naturo? Eble la realismo devas stari "kun piedo en ambaŭ mondoj".

Certe, inter la "sloganoj" sennacieco kaj homaranismo mi preferas la duan, ĉar ĝi nepre implicas sennaciecan sintenon kaj krome klare indikas *kian* sennaciecon oni volas realigi. Sen "mistika" kvalifiko sennacieco, kaj la racio, povas karakterizi aŭ la Ruĝan Krucon, aŭ la mondan trafikon en municio.

Unu el la sekvoj de la granda grupiĝo de la nacioj, kiun Lanti esperis kaj antaŭvidis, estas tio, ke nuntempe la esencoj de nacia identeco estas pli kare defendataj ne nur fare de la malgrandaj nacioj, superombritaj de la potencaj grupiĝoj, sed ankaŭ de la membraj popoloj de la grupiĝoj mem. La idealo estas varienco en unueco.

Vivu la nacieco kaj la homaranismo!

W. B. Johnson

PUPTEATRA SUKCESO

En internacia pup-teatra festo en Zagreb tre sukcesis "La teda knabo Pinokjo" el Wroclaw, kun premio por "prezento, kiu montris novajn eblecojn". La teatraĵon tradukis Jan Smykalski, kiu ankaŭ ekinstruis Esperanton, laŭ speciale preparita mini-kurso, al la aktoroj, kiuj parkerigis la tekston—ĉar neniu antaŭe scipovis Esperanton. La trupo nun prezentas "Iliadon" kaj "Trigroŝan operon" en la pola—eble poste ion pluan en Esperanto. (*Laŭ Vroclava vespera gazeto.*)

Daphne Lister

DU POEMOJ

La surdulino

Okuloj kroĉatentas edzan buŝon
Kiel savilon solan en Babelo;
Apenaŭ ŝi murmuris, timas fuŝon,
Timas, ke ŝin perfidos la orelo.
Vortoj, ridado, modmuziko svarmas
Ĥaose, grifelece kriĉparolas
Langoj babilemaj, mi ne volas
Rigardi plu ne povas, preskaŭ larmas.

La fremdulino

Cigaredstumpo pendas delipe
Karikaturtipe;
Rutinraŭke ŝi la infanojn admonas,
Kaj mi spionas
Subaŝskulte;
Kiel stulte
Ŝi insulte
Krias.
Kiel mi envias!

HELPON!

Du novaj samideanoj en Hindujo ege bezonas helpon per la provizo de ne plu bezonataj vortaroj (angl./Esp. Esp./angl.), lernolibroj kaj facila legmaterialo. Ili estas entuziasmaj lernantoj de Esperanto kiuj ne rajtas sendi monon alilanden.

- 1) Fr. John Vadakkumoola, Nirmalagiri College, Nirmalagiri P.O. Via Tellicherry, Pin-670701, Kerala, India.
- 2) Br. Mathew Manchappilly, C.M.I., St. Joseph's Monastery, Devagiri, Calicut-8, Kerala, India.

OKAZONTAJ KONFERENCOJ

La jarkunveno de Okcidenta Esperanto-Federacio okazos la 26an de majo 1979 de la 3a ĝis la 8a ptm, en Friends' Meeting House, Portishead, Avon. Portishead estas facile alirebla de la aŭtoŝoseo M5, elirejo ĉe Portbury, aŭ de Bristol.

La Interfederacia Konferenco de la tri sudokcidentaj federacioj ne okazos en Abergevenny, kiel oni intencis. Ĝi okazos anstataŭe en Coleg Addysg Uwch Gwent, en College Crescent, Caerleon, Gwent, la 7an ĝis la 9a de septembro 1979. Caerleon estas facile alirebla de la aŭtoŝoseo M4, aŭ per fervojo ktp. Vizitantoj de aliaj federacioj, aŭ de alilande, estos bonvenaj. Detaloj kaj alĝiloj de la sekretario: Philip Willey, 4B Highfield Drive, Redcliffe Bay, Portishead, Avon, BS20 8JG.

INTERNACIAJ FLORAJ LUDOJ 1979

La Kataluna Kunordiga Komitato de la Hispana Esperanto-Federacio invitas la esperantistajn poetojn kaj prozistojn ĉiulandajn konkurse konkuri per siaj verkoj en tiu tradicia festo. Estos aljuĝitaj jenaj premioj: POEZIA BRANĈO.

1. **Natura Floro**, al plej bona ama poemo (maks 80-versa).
2. **Jasmeno**, al la plej bona priesperantisma poemo (maks 80-versa).
3. **Violo**, al la plej bona humanisma aŭ etika poemo (maks 80-versa).

PROZA BRANĈO. **Premio** al plej bona novelo (maks 2000 - 2500 vorta). Regularon petu de la sekretario: Gabriel Mora i Arana, str. Carriò, 5, 4, Manresa (Barcelona), Hispanujo.

Support the Esperanto Movement's own Travel Agency by making all your Cross-channel Ferry bookings with us. Speedy and efficient service.

Esperanto Holidays Association,
Nacton, Ipswich.
Telephone: 0473-79300

NOVAJ LIBROJ

La kaŝita vivo de Zamenhof de N. Z. Maimon. Originalaj studoj, kun enkonduko de G. Waringhien. Japana Esperanto-Instituto, Tokio, 1978, 214 p.

Zamenhof skribis: "Se mi ne estus hebreo el la ghetto, la ideo pri la unuiĝo de la homaro aŭ tute ne venus al mi en la kapon aŭ ĝi neniam tenus min tiel obstine en la daŭro de mia tuta vivo." Nenio povus esti pli klara, tamen dum jardekoj esperantistoj provis kaŝi la fakton ke Zamenhof estis judo. La eldoninto de "Enciklopedio de Esperanto" (1933), citante aŭtobiografian leteron de Zamenhof, forcenzuris ĉiun mencion de lia deveno. Male la biografioj de Privat kaj Marjorie Boulton ne prisilentas liajn judajn radikojn. Sed tiuj aŭtoroj ne bone konis la nun malaperintan mondon de la orienteŭropaj judoj, kies lingvo estis la jida. En ĉi tiu grava libro, finfine, oni trovas multajn faktojn rilate al la interna vivo en la Zamenhof-familio kaj al la fontoj de lia pensado. Kelkaj ĉapitroj jam aperis en Norda Prismo kaj aliaj revuoj. Ĝi devigas nin ŝanĝi kelkajn ĝenerale akceptitajn ideojn, ekzemple pri la karaktero de Marko, la patro, kiu aperas multe pli ŝatinda. Liaj ideoj estas interesaj. Li ne estis ortodoksulo, tamen ne ateisto lau la okcidenta signifo. Liaj ideoj estis tiuj de la "klerisma" movado, kies inicianto inter la judoj en la 18a jarcento estis Moseo Mendelssohn, intima amiko de la germana poeto Lessing. Tiu movado, bazita sur raciecaj, humanistaj ideoj, estis branĉo de tuteŭropa movado, kiu pledis por toleremo inter religioj. Ĝi inspiris poetojn kiel Lessing, Goethe, Schiller. Ne estis ŝance ke Zamenhof tradukis verkojn de la du lastaj en Esperanton.

Zamenhof iam skribis ke la vera kaŭzo de intergenta malamo estas la malsameco de lingvoj kaj religioj (nia generacio povus aldoni: kaj de kvazaureligiaj sciencpretendaj politikaj ideologioj). La aŭtoro montras kiel la mondkoncepton de Zamenhof influis la biblia rakonto pri la

Turo de Babel, kaj ĝiaj komentoj de Ibn Ezra. Li pritraktas la signifon de la nomo Zamenhof, la edziĝon de la juna Ludoviko, lian intereson pri la jida lingvo kaj lian aktivecon kiel pioniro de la cionisma movado, de kiu li poste forturnis sian atenton. La ĉapitro pri Hilelismo klarigas la bazon de la ofte miskomprenata Homaranismo.

Kial oni ĝis nun malmulte atentis la mondkoncepton el kiu naskiĝis Esperanto? Al nia movado ĝis nun mankas ĝiaj filozofoj. Bazo de universala lingvo estas la universaliteco de la homo menso, alivorte la fakto (ofte pridubata) ke la homo ĉie estas kaj ĉiam restos baze la sama. Tio kontraŭas la nunan post-hegelan pensmanieron, dekstran aŭ maldekstran, kiu diigas historion kaj kondukas al malŝato de la homo kiel homo.

La libro donas gravajn faktojn, kaj krome starigas demandon. Ĉu la "praktikaj" homoj, kiuj opiniis necese kaŝi la devenon de Zamenhof, multe komprenis pri la esenco de Esperanto? Kiam ekblovis malfavora vento iliaj rezultoj vezike neniigis. Estas al mi evidente ke praktikaj bezonoj, kiel ajn urĝaj, neniam venkigos Esperanton. Ideoj efikas pli ol ekonomio; la homoj kiuj neas tion ofte montras sian veran sintenon cenzurante alies ideojn.

La libro montras ke Esperanto trovas sian bazon en la "klerisma" movado, kaj mi aldonas ke tiu movado mem vivas per la universalismaj ideoj de persistoj el la 17a jarcento, la granda epoko de eŭropa pensado, en kiu floris inter aliaj Spinoza, juddevena kiel Zamenhof. Se oni demandas kial Esperanto, sola inter multaj similaj projektoj, montras vivkapablon, la respondo estas la mondkoncepto el kiu ĝi naskiĝis, kiu estas kaj estos ĝia bazo.

La Japana Esperanto-instituto bonege servis la movadon per ĉi tiu eldono, kiu estas unu el multaj signoj de la vicleco de la japana movado.

Albert Goodheir

Brand, de Henrik Ibsen. El la norvega trad. Erling Anker Haugen. Ilustrita de la

tradukinto, kun postparolo de K. Kalocsay. Serio Oriento-Okcidento n-ro 13. Antverpeno-La Laguna, 1978. 320p.

Brand. La nomo mem efikas, kiel ekkria signo. Peer Gynt, la vaganta nubo, havas du nomojn, Brand, la firma roko, nur unu. Li staras sola. Laŭ la enkonduko, far la tradukinto, Ibsen diris: "Tio, ke Brand estas pastro, estas sen-signifa . . ." Kaj, ke li povus "fari la saman silogismon egale bone pri skulptisto aŭ politikisto". Nu, jes, eble . . . Mi povas imagi Brand-on granda skulptisto aŭ katastrofa politikisto (kvankam ne sukcesa plumbisto) kaj la argumento povus esti sama, sed la homo ne estus, ĉar la pastra alvokiĝo estas esenca parto de Brand, kies Dio estas tiu, kiu elsputas la mezvarmulojn.

Ĉiukaze, la verko estas kompleksa kaj multnivela. Interplektiĝas multaj fadenoj en la filozfia tuto, fadenoj de fremdiĝo, de simbolismo, de socia satiro. La verko konstante stimulas la spektantojn aŭ leganton, jen oni admiras Brand-on, jen oni volas kontraŭ-argumenti, jen kunsentas, jen senpacienca, sed kompreneble la reagoj varias laŭ la vidpunkto de la spektanto/leganto.

En la teatraĵo, tamen, oni ne vere kontraŭargumentas la fundamentan principon de Brand "ĉiom aŭ neniom". La vilaĝaj oficistoj, ĉu ili subtenas aŭ kontraŭstaras Brandon, argumentas nerilate. Ili kritikas lian konduton, la sekvojn de lia principo, aŭ ili plendas, ke lia principo ne validas por tiu loko aŭ tiu epoko, sed ili ne atakas liajn premisojn. La oficistoj, cetere, estas riĉa fonto de socia satiro, eĉ ironia humuro.

"Brand" do estas teatraĵo de fremdiĝo pli ol dialektiko. En ĝi, kiel en la vivo, oni aŭdas la vortojn de aliaj sed ne auskultas, ne komprenas la nociojn sub la vortoj. Brand:

Ne estas monde tia solo
kiel kun tiu ĉi publiko,
seneŝe mia alparolo
revenas al mi, kiel kviko.

Sendube "Brand" prezentis al la tradukanto kolosan taskon, ne nur pro la enhavo, sed pro la formo, ĉar ĝi estas versdramo, kaj la versoj rimiĝas, kio povus konduki al plena banaliĝo. Pli alte mi ne povas komplimenti la tradukinton ol diri, ke la traduko legiĝas kvazaŭ originalo. La versoj fluas nature, sen tordiĝo, sen streĉiteco. Entute libro ĉiel impona, enhave, forme kaj laŭ la prezento. Eĉ malmultajn preserarojn mi rimarkis!

Daphne Lister

Erevono de Samuel Butler. El la angla tradukis Alec Venture. BEA, 1978. 176 p. Prezo: £2,22.

Jen estas iom stranga romano. Dum la unua parto de la libro la rakontanto (la aŭtoro uzas la unuan personon) priskribas sian serĉon por 'nova lando', kiun li fakte trovas, sed en kiu la socio pensas inverse al la nia. En tiu lando—Erevono (angla originalo Erewhon, inversa formo de Nowhere aŭ Nenie)—malsani estas krimo kaj postulas enkarcerigon, sed ŝteli, delikti, ktp montras 'malsanon' kaj postulas kuracon. Troviĝas aliaj kontraŭoj de nia kutima vivmaniero.

Dum la dua parto la aŭtoro, kiel rakontanto, detale pritraktas la morojn de tiu popolo erevona kaj filozofias pri ili rilate al niaj moroj. Ekzistas en tiu parto pli malpli kontinua rakonto, tamen ne estas fortaj ligoj en la historia ĉeno.

En la tria parto denove estas romana historio dum la rakontanto priskribas sian eskapon de Erevono kune kun sia fianĉino.

Do, la libro estas ne ĝuste romano; ĝi estas mikspoto de rakonto kaj filozofia diskuto.

Kiel oni rajtas atendi de la tradukinto, la lingvaĵo estas apenaŭ kritikenda. Alec Venture (Avo de Brita Esperantisto) estas evidenta tradiciisto, kiu scipovas Esperanton absolute. Pro tio la legado estas vera ĝuo.

Sed mi ni povas kompreni kial li, aŭ supozeble li, subtitolis la libron 'utopia satira romano'. Romano ĝi ne povas

esti laŭ la vortaro-difino. Utopia estas dubebla epiteto ĉar la rakontanto fuĝas la landon pro timo de (plia) persekutado; Erevono neniel povus esti perfekta lando. Kaj satira ne estas ĝusta vorto por priskribi la sintenon de la aŭtoro al la moroj de la loĝantoj; li pritraktas tiujn preskaŭ klinike. Tio ĉi estas grava afero ĉar legonto deziras mallongan resumon de libro aĉetota kaj tiu priskribo sur la kovrilo estas, laŭ mia opinio, ĉute erariga.

Erevono, tamen, estas leginda libro precepte por tiuj, al kiuj plaĉas 'pura Esperanto'. Esperable ĝi ankaŭ efikas diskonigi alian faceton de la angla literaturo deklinaŭ-jarcenta.

Aleksandro Mollison

Guðrun, de Johannes V. Jensen. El la dana trad. Guðrun R. Jensen kaj H. E. Jensen. Dansk E-Forlag, 1977. 134p.

Jen rakonto simpla, preskaŭ naïva, pri laboranta junulino en Kopenhago dum la 30aj jaroj, kiu perdas sian fianĉon ĉar ŝi akompanas, preskaŭ kontraŭvole, sian ĉefon dum londona afervizito—kaj kompreneble la homoj klaĉas pri ŝi. Pli-malpli senbaze. Feliĉe, post okazajoj iom melodramecaj, ŝi retrovas la fianĉon kaj vivas por ĉiam feliĉe. La rakonton savas la elstara priskriba talento de la nobel-premiita aŭtoro: li scias konturi plej indviduecajn portretojn kaj sentigi pejzaĝojn urbajn kaj kamparajn. Agrable facila legaĵo.

W. Auld

La Ĝardeno de la Urbestro, de Lina Gabrielli. Eldono Gabrielli, 1978, 108 paĝoj, 12 gld.

Ĝuintoj de "Karnavalo" eble bedaŭros, ke la nova novelaro de Lina Gabrielli ŝajne temas nur pri dombestoj. Sed nur ŝajne: la vera ĉef-temo estas morto. Kaj homaj rilatoj ombritaj de morto: en "La bonŝanca muŝeto" temas pri "demandoj ofte maloportunaj, kiuj fuŝas la plezuron de bona ago farita en silento", kiuj hontigas rakontantinon, kiu ne sukcesas nerimarkite liberigi kaptitan muson; en la

plej bela rakonto "Ĉiĉjo" pri malpremo sentita post sukcesa entombigo de kato. Kaj en la surpriza "Fariĝi centjara" rolas — kvankam bube aŭ eĉ beste — tamen geviroj.

Iom pri la konsisto de la libro. Duone ĝi estas ital-lingva. La 10 noveloj estas 3–4-paĝaj, ĉiuj krom unu en E-o kaj poste en la itala, kun pli longa enkonduko, "Międzygórze" (nur en E-o) pri la estiĝo de kelkaj. La aŭtorino mem avertas, ke komparoj inter la du tekstoj estos "tute neutilaj". Tamen la E-leganto pli ĝuos "La bonŝanca muŝeto": rimarkante, ke la fino okazas en septembro, ŝi trovos ke pli frue temis pri februaro. La itala leganto trovos nur fin-daton — en oktobro.

Do jen almenaŭ tri majstraj noveloj en plej simpla linĝvo — kaj nepre havinda libro.

Kris Long

La opia milito. 114p. **La revolucio de 1911**. 151p. Ambaŭ libroj de la Kompila Grupo por la Broŝuroj pri la "Moderna Ĉina Historio", eldonitaj de Fremdlingva Eldonejo, Pekino, 1978. Prezo po £0,65.

Eksterordinare interesaj legaĵoj por interesigintoj pri la moderna historio. Kiom objektivaj ili estas, tio estas malfacile taksebla; vere objektiva versio de la historio estas neimagebla. Usono kaj Britujo aperas, kompreneble, kiel malbonuloj kaj misfarantoj—sed en la priskribitaj eventoj ekzistas iom da pravigo por tia starpunkto. Oni povas lerni ankaŭ de "la alia flanko".

W. Auld

La nova butikisto de Nukugaia, kaj aliaj noveloj, de Bertram Potts. TK/Stafeto, Antverpeno-La Laguna, 1978. 250p.

Jen kolekto de 13 rakontoj bonhumoraj, viglaj, faciletosaj, kiun legi ĝuos ĉiu normalulo. Fakte, ĝi estas tia legaĵo, kia, laŭ kelkaj, tro mankas en originala Esperanto: distra, senpena, "facila". Aliflanke, la neordinara (por la plimulto el ni) scenejo de la rakontoj: Novzelando

kaj Sudpacifiko, aldonas dimension al la okazaĵoj, kaj la spritaj konversacioj de la rolantoj ankaŭ neordinarigas la legadon. Potts estas jam konata pro pli frua kolekto "Nokto da timo"; tiu ĉi nova kolekto plifirmigos lian reputacion.

W. Auld

Kial ne? Festa numero. Red. Jano. Eld. Junularo Esperantista Brita, 1978. 100p.

Ĉirkaŭ 1960 naskiĝis la revuo "Kial ne?" kiel vigla organo de la tiam fondita JEB, kaj dum multaj jaroj ĝi ĝuis ekziston jen regulan, jen sporadan. Pro la ordinara malfacilaĵo de organizaĵo junulara, nome la pliaĝiĝo kaj sekva malaperado de la anoj, funkciuloj, inkluzive de redaktoroj, funkciis nur dum certa tempo kaj frue frontis al la problemo de taŭgaj anstataŭ-ontoj. Malgraŭ ĉiuj problemoj tiaj, JEB plu ekzistas kaj aktivas, kaj aperis tiu ĉi festa numero de la organo, kun interesa kaj varia enhavo: artikoloj, poemoj, ŝercoj, ludoj, felietona bildrakonto pri "Superzam", kaj (estu avertita aŭ atentigita laŭguste) maloftaĵo en formo de maldecega sed samtempe amuza versaĵo pri la amoraj aventuroj de "Eskimino". Vere malmultekosta kaj posedinda eldonaĵo. Se vi aĉetos ĝin, vi kuragiĝos niajn junajn fortojn.

Proverbaro, laŭ L. L. Zamenhof k.a. Tamtama Eldonejo, Tesaloniko, 1976. 142p.

Jen bele produktita libro, en kiu listiĝas esperantaj proverboj kaj aliaj esprimoj laŭ ilia longeco kaj ilia ritmo. Ĝi estas bona fonto de materialoj por tiuj, kiuj volas studi bonan E-stilon kaj la formadon de elegantaj frazoj en nia lingvo.

Tondaĵoj, Knipsels, Wycinanki, de Wouter F. Pilger. Vulpo-libroj, 1978. 27p.

En tiu ĉi kolekto de porinfanaj versaĵetoj, ĉiu poemo aperas samtempe en la lingvoj esperanta, nederlanda kaj pola. La aŭtoro klarigas:

Kial en tri lingvoj?

Por ke Silvia legu ĝin
trifoje, sen ripeto.

Feliĉa estas la eta Silvia, kiu posedas denaske tri lingvojn! Infanoj, kiuj posedas eventuale nur unu el la tri lingvoj tamen ĝuos la libreton same. Ciu versaĵo komentas pri papertondaja ilustraĵo en vigla kaj agrabla maniero, kaj la liberto tre bele aspektas.

Nia kantikaro, de Roger Bernard kaj Roger Degrelle. Franca Katolika Esperanto-Asocio.

Kolekto de 68 kantikoj aparte taŭgaj por romkatolikaj diservoj. La muziko akompanas ĉiun tekston, kaj la tradukoj estas altnivelaj.

Estas represitaj:

Katalogo pri poŝtaj Esperanto Stampoj, de R. Burmeister. 3a eldono, 1978. Esperanto Ligo Filatelista kaj Amika Rondo de Esperantaj-Kolektantoj. 23p.

A practical course in Esperanto, de Dr. Ferenc Szilágyi. Represo de la 12a eldono, The Esperanto Publishing Co., 1977. 100p.

Vivo de Zamenhof, de D-ro Edmond Privat. Represo de la 5a eldono. The Esperanto Publishing Co., 1977. 133p, 15 fotoj.

PETO EL ĈINUJO

S-ino ŜI IMIN, Changsha Lu, 149 Long. 32 Hao, Shanghai, Cinujo, 54-jara dommastrino, eklernis Esperanton en 1949 kaj volas helpi nian movadon vigliĝi en ŝia lando, sed tre mankas lernolibroj, vortaroj kaj legaĵoj en Esperanto. Pretas rekompenci per silkaĵoj aŭ bildgazetoj. Sopiras al literaturaĵoj. Kiu helpos?

LIMDATO

Limdato por ricevo de materialoj celantaj la proksiman numeron estas la 27a de aprilo.

ANONCETOJ

3p por ĉiu vorto. Minimume 45p. Antaŭ-pagenda.

Libera Tendumado

Ni petas ĉiujn kiuj ŝatus tendumi, tendumi kun ni de la 1-a ĝis la 8-a de julio en la tendumo Hertogenwald en la belga urbo Eupen (Limregiono Nederlando-Germanio). Vi mem tendumos sed povas certi pri ĉeesto de pluraj esperantistoj kiuj internaciigos vian tibertempon. Nederlanda-Esperanta Junularo, Raadhuisstraat 18, Geleen por informoj tel. 04494 43518 Nederlando.

Kio estas SAT? Sennacieca Asocio Tutmonda bonvenigas informpetojn. Informiĝu ĉe: SAT en Britio, 29 Farrance Road, Chadwell Heath, Essex, RM6 6EB.

Are you using your insurance to help Esperanto at no cost to yourself? If not, please write to G. D. Carter, 51 Wyche Road, Malvern, Worcs.

You could set up a Special Memorial Fund within the Norwich Jubilee Esperanto Foundation which would provide the gift of a Book or a Travelship and thus provide a permanent Memorial to yourself, your dear one, or your great friend. Particulars from Norman Williams, M.A., B.Sc., 237 Two Trees Lane, Denton, Manchester, M34 1QL.

SCOUTS! Join the Scout Esperanto League. Enquire 21 Brookfield Avenue, Waterloo, Liverpool, L22 3YE.

MOTORISTS! Join the International Motorists Club (IEKA). Life Membership £1.65. British Representative: J. Brownlee, 20 Sunnyside Gardens, Upminster, Essex, RM14 3DS.

Volas Korespondi

4 knabinoj, Sylvia, Karin, Ramona, Sylvia, pri bildkartoj, muzikteksoj, ktp, Sylvia Schwarzbach, 8300 PIRNA 3, Ludwig Richter-straase No. 18 DDR-GDR.

Ramon Astrada, Hogar de Ancianos, 8900 Villa Maria CBA Argentina. S-ro Helmut Bein, 409 Halle-Neustadt, Block 147/2, DDR/GDR, kolektas bildkartojn kaj poŝtmarkojn.

Anti-Ro Attitudes

NATIONAL ATHEISTS who believe that the human race is rightly "culled" by war, and who therefore accept the possibility of atomic destruction, logically oppose Ro.

OTHER ANTI-RO ATTITUDES often result from lack of integrated thought. This can be remedied by reflection.

ON WHAT IS YOUR ATTITUDE BASED? Do you oppose Ro World Government because you consider the absorption of the many into one an impossibility? But it has actually occurred over and over again throughout history e.g. in England in the 10th century, in N. America (formation of U.S.A.) in the 18th century. Do those who admit such developments regret them and wish to go back to former disunity? Is it that they believe unity right when achieved but wrong when attempted? Perhaps they swallow the silly Communist claim that a World State must be Communist. If a Communist World State develops, whose fault will it be now that Ro is here as the sensible alternative to Anachronistic Atheist Nationalism?

Ro is short for
Regneco. Write for
The Mitchell Report.



The Ro Organizer,
BM/World State House,
London W.C. 1.